# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban,* **PERPIGNAN** *(P.-O.) - Telefono 34-38-84*

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o- NUMERO 5 -o-o-o-o-o- JANUARO 1962 -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE U.E.F. EN L Y O N , ĉe BRASSERIE DE L'ETOILE, 1, COURS GAMBETTA (LYON 3°), SABATON 17an FEBRUARO 1962 je 20.30 horo kaj DIMANĈON 18an je 9a horo. (La kunvenejo troviĝas ĉe la enirejo de PONTO DE LA GUILLOTIERE, maldekstra bordo de rivero Rhône, proksime de PLACO BELLECOUR en la centra urboparto).

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

De antaŭ kelkaj monatoj estiĝis krizo ĉe la U.E.F.-Estraro. Ĉar la afero jam disvastiĝis sufiĉe, mi ne hezitas pritrakti ĝin klare. Jen resume la faktoj : La kompetenta kaj sindona samideano André Ribot, Ĝenerala Sekretario de U.E.F., dissendis cirkulerojn per kiuj li esprimis energiajn plendojn kontraŭ alia laborema kaj ne malpli kompetenta esperantisto, S-ro. Pierre Petit.

Nia bulteno ne havas sufiĉe da spaco por montri al vi la laŭdindan aktivecon de ambaŭ samideanoj. Same S-ro Ribot kiel S-ro Petit havas grandegajn meritojn, ĉar ambaŭ tre fervore kaj sindone propagandis la Esperanto-idealon.

Tial la afero estas pli tikla, ĉar temas pri du plenmeritaj esperantistoj. S-ro Ribot postulas la eksigon de S-ro Petit de la Estraro kaj Konsilio de U.E.F., kaj por efektivigi tion, li petis la kunvokon de Eksterordinara Ĝenerala Kunveno en Clermont-Ferrand.

Longa korespondado estiĝis inter la plej konataj Esperanto-gvidantoj de Francujo por provi amike solvi la konflikton, bedaŭrinde sensukcese.

Estante bonega amiko de S-roj. Petit kaj Ribot, mi mem estis devigita alpreni neŭtralan sintenon, kaj, pro mia posteno de U.E.F.-Prezidanto, ludi arbitracian rolon.

La 9an Decembro 1961, la U.E.F.-Konsilio kunvenis en Parizo kaj la ĉeestantaj konsilianoj agnoskis, ke la nura ebla solvo estas submetiĝi al la decido de la tuta U.E.F.-Membraro (aktiva membraro, kompreneble). Por konsulti ties opinion, oni decidis okazigi Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon la 17an kaj 18an Februaro. Oni elektis tiam la urbon Bourges, sed estiĝis malfacilaĵoj kaj mi mem proponis la urbon Lyon. Kial ? Tute simple, ĉar S-ro Ribot estis proponinta Clermont-Ferrand kaj S-ro. Petit, Tours, ni estis devigitaj trovi trian urbon por doni kiel eble plej neŭtralan karakteron al la Kunveno.

Lyon havas bonegajn kaj rapidajn trajno-komunikojn kun ĉiuj francaj gravaj urboj ; ankaŭ ĝi havas multajn hotelojn, do, ne estos problemo pri komforta loĝado.

La U.E.F.-Konsilianoj ĉeestintaj la kunvenon de la 9a Decembro en Parizo decidis kolektive demisii dum la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno, do, oni devos elekti la 15 konsilianojn de la dua kategorio (artikolo 6 de la U.E.F.-Statutoj). La voĉdonilo estos sendata al ĉiuj aktivaj membroj (nuraj kiuj rajtas partopreni la administradon de la asocio), kune kun la revuo "Franca Esperantisto".

Tiuj, kiuj povos iri al Lyon, voĉdonos rekte kaj tiuj, kiuj ne povos tien iri, povas sendi la voĉdonilojn al la Prezidanto de ilia respektiva regiona Federacio.

En Lyon devas regi nepre amika atmosfero. Ni ĉiuj plene deziras ke U.E.F. estu tute demokrata asocio. Tial, mi opinias ke la fundamenta punkto de la tagordo devas esti la elmontrado de la respektivaj vidpunktoj fare de S-roj. Ribot kaj Petit, laŭ kiel eble plej senpasia kaj amikeca maniero.

Mi proponas, ekzemple, ke S-ro Ribot diru klare kion li riproĉas al S-ro Petit kaj ke, post ĉiu aserto de S-ro Ribot, S-ro Petit prezentu sian defendon kontraŭ tiu aserto. Tio ŝajnas al mi nepre necesa, ĉar multaj U.E.F.-anoj ne ricevis la cirkule-

.../...

(daŭrigo)

rojn kaj rajtas esti plene informitaj. Sed mi ripetas, tion oni devos fari laŭ plej delikata maniero. Kiel Prezidanto, mi ne povos konsenti pri debato en kiu miksiĝos personaj malagrablaj aludoj.

Post tiu publika debato, oni voĉdonos la 15 konsilianojn elekteblajn de la U.E.F. membraro, kaj la Konsilio tiel kompletigita elektos siaflanke novan Estraron.

La afero estas, do, en la manoj de ĉiuj membroj de nia nacia Esperanto-asocio. Ni ne forgesu por solvi ĝin, ke la forto kiu donis impulson al la Esperanto-Movado, en nia mondo ŝarĝita de materialismo kaj terura malbona volo, estis la interna ideo de amikeco, paco, solidareco kaj bona volo, kaj ke sen tiu forto, Esperanto estus pereinta milfoje. Kiel fenikso, ĝi renaskiĝis ĉiam el siaj cindroj dank'al la blovo de tiu idealismo. Estu tiu sama vento kiu blovu dum la Kunveno en Lyon.

RENE LLECH-WALTER, PREZIDANTO DE U.E.F.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Jen kelkaj praktikaj detaloj pri la Kunveno en Lyon : Verŝajne ne estos problemo pri loĝado, sed se vi deziras tion, vi povas peti informojn pri la Lionaj hoteloj al nia sindona samideanino F-ino. G. Perra, 145 Avenue Lacassagne, Lyon-3°, aldonante koverton afrankitan kun via adreso. Ĉar la dimanĉon 18an Februaro la Liona Esperanto-Societo estis aranĝinta por la 15a horo feston kaj amikan kunvenon, niaj lionaj samideanoj bonvolas inviti ĉiujn ĉeestontojn al la U.E.F. Kunveno ĉeesti tiun amikecan feston. Ankaŭ okazos komuna tagmanĝo ĉe la sama kunvenejo. Tiuj, kiuj deziras partopreni tiun tagmanĝon, devas sendi 9 N.F. al F-ino. G. Perra, C.C.P. Lyon 765-85.

La kompleta adreso de la Kunvenejo troviĝas ĉe la titolo de nia ĉefartikolo.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

LA KULTURA ESPERANTISTA CENTRO DE PERPIGNAN INDE KUNMEMORIS LA 102an DATREVENON DE ZAMENHOF KAJ LA 13an DATREVENON DE LA UNIVERSALA DEKLARACIO PRI LA HOMAJ RAJTOJ.

Ĉar mankas la spaco, jen resumo pri la aranĝoj : Okazis prelegoj pri la du eventoj menciitaj ĉe la titolo en Lernejo Racine, Metia Lernejo "Jean Alio" kaj Porinstruista Seminario de Perpignan, kaj en la Metiaj Lernejoj de Rivesaltes kaj Espira de l'Agly (apud Perpignan), dum la memoriga semajno (10a ĝis 17a Decembro 1961). La dimanĉon 17an, en Lernejo Racine, okazis solena festo, dum kiu oni ekspoziciis kaj komentis la afiŝojn eldonitajn de U.N.E.S.C.O. en Esperanto pri la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Parolis al la ĉeestantoj S-ro. Llech-Walter, Prezidanto de Unio Esperantista Franca, S-ro. André Ribot, el Marmande, S-ro. Léo Lentaigne, el Montpellier kaj S-ro. Dario Rodriguez, el Madrido. Ĉeestis, interalie, S-ro. Barboteu, Inspektoro de la Junularo kaj Sportoj kaj S-ro Ducanchez, Intendanto de la Porinstruista Seminario.

---

PRELEGOJ DE S-RO LLECH-WALTER EN HISPANUJO.

Invitita de la Esperanto-Grupo de Moyá kaj de la Esperanto-Fako de "Lingua Club" de Manresa (Hispana Katalunio), nia Prezidanto prelegis en ambaŭ urboj la 23an, 24an kaj 25an Novembro pasinta. Ĉar multaj neesperantistoj sekvis la prelegojn (tiu de Moyá estis tradukita al la kataluna lingvo fare de nia kompetenta samideano Ramón Molera, U.E.A.-ĉefdelegito por Hispanujo), estas espereble ke kelkaj personoj estis instigitaj partopreni la Esperantajn kursojn de niaj tieaj sindonaj samideanoj. Revene al Perpignan, S-ro. Llech-Walter havis la plezuron viziti nian eminentan samideanon Delfí Dalmau, Akademiano, en Barcelono.

---

54a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ KULTURA ESPERANTISTA SEMAJNO EN GRESILLON (BAUGE)

La Kultura Semajno okazos de la 16a ĝis la 23a Aprilo 1962 (Pasko) en la Kastelo Grésillon, BAUGE (Maine-et-Loire), kun interesplena programo. De la 21a ĝis la 23a okazos la 54a Nacia Kongreso. Evidente, tiuj kiuj ne povos partopreni la Kulturan Semajnon, rajtas ĉeesti nur la Kongreson, se ili tion deziras. Aliĝo : Por la **Kultura** Semajno kaj Kongreso, 13 N.F. Se vi deziras aliĝilojn kaj informojn, petu de la Direktoro de la Kulturdomo Grésillon, S-ro. Henri Micard, EPINEUX-LE-SEGUIN (Mayenne) aŭ de U.E.F., 34 Rue de Chabrol, Paris - X°.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

KORAJN BONDEZIROJN KAJ PROSPERON AL ĈIUJ DUM LA NOVA JARO 1962 !